Stockholm 2 junio 1945.

Ĉiniko, Danke ricevis vian karton! Morgaŭ ni ekspedos la petskribon pri la honormedalo de Nylén.

Hodiaŭ mi ankaŭ ricevis longan leteron de Åberg. Ni stokholmanoj kunvenos vendrede, la 8 junio. Se vi ĝis tiam povus fari viajn rimarkojn pri la proponoj de Åberg, mi estus danka, ĉar tio faciligus nian diskuton.

Mi iom trafoliumis la tekstojn por Esperanta Studservo, kaj mi trovis ilin ĝenerale bonaj. Tiun ĉi semajnon mi havos tre multe da aliaj laboroj, kaj detale mi ne havos eblecon trastudi la tekstojn. Sed la aliaj komitatanoj ja tion faras. Mi fidas je ili.

Kun koraj salutoj

Ernst